Informilo de Baltiaj Esperanto-Tagoj, BET-55 en Panevėžys, Litovio

# Abelo



Sabato, la 6-a de julio 2019

*N-ro 1*

## Salutmesaĝo de Vytenis Povilas Andriukaitis, Membro de Eŭropa Komisiono



**Karaj gesamideanoj,**

Mi estas granda amanto de Esperanto, ĝia fano, admiranto, amiko, propagandisto kaj subtenanto. Kaj ne nur. Mi komprenas historian kaj kulturan sencon, konserviĝeman valoron de ĉi tiu ekskluziva lingvo. Havante precipajn ligojn kun Litovio, ĝi estas ankoraŭ pli proksima por ni. Dum soveta tempo Esperanto ja estis formo de protesto kontraŭ dominado de altrudata rusa lingvo. Pro tio ankaŭ mi, aktive partoprenante en rezista movado, ĉirkaŭ la jaro 1975 proponis paroli ne ruslingve, sed Esperante, ĉar tiu lingvo simbolis humanecon kaj demokration. Esperanton mi ellernis en junaĝo, inspirita de ĝia fundamenta ideo – strebado al idealo de paca mondo, en kiu regus egalaj rajtoj kaj justeco.

Dum tempofluo Esperanto iĝis ponto inter homoj kaj popoloj, kaj tiu ponto helpas ekkoni diversecon de kulturoj. Baltiaj Esperanto-Tagoj jam fariĝis tuteŭropa aranĝo kun multjara tradicio – kaj la 55-aj tion pruvas – ĝi kunvenigis amason da partoprenantoj el pli ol 30 landoj, diferencaj per siaj lingvoj, kulturoj, tradicioj. Tio ankoraŭfoje pruvas, kiom multe da komunaĵoj ni kunhavas: deziron ekkoni unuj la aliajn, komunikiĝi kaj kunlabori. Nin unuigas la lingvo, detruanta murojn kaj vaste malfermanta pordon al la mondo.

Mi salutas la organizantojn kaj partoprenantojn de la aranĝo, kiu gravas por Litovio ankaŭ por la tuta Eŭropo. Mi deziras al ĉiuj interesajn diskutojn, produktivan etoson kaj longedaŭrajn impresojn de restado en Litovio.

Mi esperas, ke ĉio tio instigos vin ankoraŭ iam reveni en Litovion.

## Programo

### La 5-a de julio (vendredo)

**10.00 – 22.00** Registrado de la partoprenantoj, loĝigo, informoj (en universitata konstruaĵo, Nemuno str. 33)

### La 6-a de julio (sabato)

**09.00 – 22.00** Registrado de la partoprenantoj, loĝigo, informoj (samloke)

**13.00 – 14.00** Tagmanĝo (memstare)

**18.00 – 19.00** Vespermanĝo (memstare)

**19.30 – 20.00** Komuna organiza kunveno de BET-anoj (Ĉefsalono)

**20.00 – 21.00** Koncerto ne Natalia Bertse kaj kantado de la Nacia Glorkanto (Ĉefsalono)

### La 7-a de julio (dimanĉo)

**07.00 – 08.00** Matenmanĝo – la unua alterno. En la kafejo de la scienca kaj teknologia parko, J. Žemgulio str. 46.

**08.00 – 09.00** Matenmanĝo – la dua alterno. En kafejo de scienca kaj teknologia parko, J. Žemgulio str. 46.

**09.00 – 10.00** **Organizaj kunvenoj** de gvidantoj kaj vizitantoj de ĉiunivelaj Esperanto-kursoj, gvidantoj kaj prelegantoj de Somera Universitato, gvidantoj kaj prelegantoj de SUS-36 de AIS, gvidantoj kaj vizitantoj de aliaj konstantaj programeroj (Ĉefsalono)

**10.00 – 11.00** **Malfermo de Somera Universitato.** La unua prelego el la prelegociklo de prof. Aloyzas Gudavičius pri la litovaj lingvo, kulturo, historio (ĉambro 117).

**10.00 – 11.00** **Inaŭguro de SUS-36 de AIS.** La unua prelego de prof. Amri Wandel el la triprelega kurso „Spacteleskopoj: de Hubble ĝis James Webb“ (ĉambro 204).

**10.00 – 11.00** **Prelegserio de d-ro Gábor Márkus** “Ĉu Esperanto plibonigis/plibonigos la mondon?”: la unua prelego “De animala ekzisto ĝis diiĝo” (ĉambro 118).

# Salutmesaĝo de la prezidanto de UEA



Pli ol duona jarcento da historio pretigis la vojon al la la ĉi-jara BET – rimarkinda atingo, des pli, se ni konsideras la enormajn sociajn ŝanĝojn, kiuj travivis la baltiaj landoj en tiuj jardekoj. Eĉ pli mirinda estas la organiza kaj kultura nivelo de la aranĝo, kiu perlaboris famon multe pli vastan, ol nur en sia regiono. Nu, tion vi jam scias, vi anoj de la 55-a BET, ĉar vi saĝe rezervis semajnon de la eŭropa somero por trempi vin en la gaja kaj profunda esperantisteco de ĉi tiu mondoparto. Gratulon pro via elekto! Multajn el vi mi esperas revidi ĉe la posta Universala Kongreso en Lahtio, Finnlando – sed eĉ sen tio vi certigis al vi belan sperton.

Unu el la paradoksoj de Esperanto estas tio, ke ĝiaj kulturaj valoroj – kombino de lingva kreemo, internacia amikeco kaj mondoŝanĝa vizio – estas malfacile komunikeblaj al homoj, kiuj ne spertis ilin rekte mem. Tio substrekas la gravecon allogi al BET novajn lernantojn de Esperanto, kaj doni al tiuj novuloj subtenon, kuraĝigon, kaj multajn okazojn por ekzerci kaj plibonigi sian regon de la lingvo. Tiuspeca agado tuŝas ĉiujn agadkampojn de UEA – Konsciigo, Kapabligo, Komunumo, Kunordigo. Mi esperas, ke vi ne nur bonvenigos la novulojn, sed ankaŭ elkovos novajn iniciatojn por plimultigi ilin. Tiel vi kontribuos al niaj mondvastaj streboj renovigi la movadon kaj meti ĝin sur la vojon al kresko.

Mi deziras al vi ĉiuj ĝojplenan semajnon en bela Litovio!

**D-ro Mark Fettes**
Prezidanto
Universala Esperanto-Asocio

**10.00 – 11.30** **La unuaj lecionoj** de ĉiunivelaj Esperanto-kursoj (ĉambroj 303–311)|.

**11.00–12.00** **Prelegociklo "Lingvo kaj kulturo"** de prof. Ilona Koutny. La unua prelego "Interkultura komunikado kaj Esperanto" (ĉambro 117).

**11.00–12.00** **Prelegserio de Yves Nevelsteen** kadre de SUS-36 "Oftaj eraroj kaj novaj vortoj en Esperanto" (ĉambro 124) .

**11.00–12.00** **Prelegserio de prof. Walter Żelazny pri religioj:** la unua prelego (ĉambro 118).

**12.30–13.30** **Tagmanĝo – la unua alterno.** En la kafejo de la scienca kaj teknologia parko (J. Žemgulio str. 46).

**13.30–14.30** **Tagmanĝo – la dua alterno** (samloke).

**15.00–16.00** **Solena inaŭguro de BET-55.** En la urba Komunuma Centro (Kranto str. 28).

**16.00–17.00** **Urba koncerto** por la partoprenantoj de BET-55 (samloke).

**17.00–18.00** **Akcepto** por la partoprenantoj de BET-55 (samloke).

**18.30–19.30** **Vespermanĝo** – la unua alterno. En la kafejo de la scienca kaj teknologia parko (J. Žemgulio str. 46).

**19.30–20.30** **Vespermanĝo** – la dua alterno (samloke).

**21.00–22.00** **Koncerto de la grupo "Sepa kaj Asorti"** – en la ĉefa salono de la universitata konstruaĵo (Nemuno str. 33).

# Manĝmenuo por BET-55

**La 1a tago, dimanĉo** (2019-07-07)

| | | |
|---|---|---|
| **Matenmanĝo** 7:00 – 9:00 | Kaĉo el hordea grio | 200 g |
| | Lakta kolbaseto | 60 g |
| | Freŝaj legomoj | 50 g |
| | Kafo, teo | 200 g |
| **Tagmanĝo** 12:30 – 14:30 | Tomata supo kun rizo | 250 g |
| | Fritita marezoko | 100 g |
| | Fritita kokaĵo | 100 g |
| | Terpoma pureo | 100 g |
| | Karota salato | 60 g |
| | Freŝaj legomoj | 40 g |
| **Vespermanĝo** 17:30 -19:30 | Flanoj kun kazeo, konfitaĵo, kremo | 200g / 40 g |
| | Vilaĝaj flanoj kun konfitaĵo, kremo | 200 g / 40 g |
| | Teo | 200 g |

# IKU-Libro




La tekstoj de la Internacia Kongresa Universitato (IKU), ekde 1997 eldonataj ĉiujare kiel la IKU-libro, jam delonge fariĝis la plej altnivela regula scienca eldonaĵo en Esperanto. La ĉi-jara IKU-libro unuafoje havas, aldone al la tekstoj de la IKU-prelegoj, okazontaj dum la 104-a UK en Finnlando, ankaŭ la tekstojn de naŭ AIS-kursoj kaj prelegoj, okazantaj kadre de la 36-a Sanmarineca Universita Sesio en BET. Ĝi estas aĉetebla dum BET-55 en la libroservo, ankaŭ dum la SUS-prelegoj, por speciala kongresa prezo de 15 eŭroj (post BET-55 kaj la 104-a UK la prezo estos 18 eŭroj). **Amri Wandel**

# Instruado dum BET-55



**1. Veraj komencantoj** lernu en A1. Ili lernu kun la fama kaj ŝatata instruisto Stano Marĉek de Slovakio, kiu instruos per la tre konata „Esperanto per rekta metodo“.

**2. Komencintoj,** kiuj jam iom lernis Esperanton, scias la ofte uzatajn vortojn, kapablas kunmeti simplajn frazojn kaj komprenas simplajn tekstojn, elektu la nivelon B1. Kun ili laboros fidela instruistino de litovaj BET-oj Nina Petuchovska de Pollando kaj ĵurnalisto, aktivulo Abdurahman Junusov de Dagestano, kiu estas sperta instruisto kaj aŭtoro de lernolibro „Esperanto? Estas facile! Lernolibro de Esperanto por rusoj.“






**3. Progresantoj,** kiuj jam povas elturniĝi en la ĉiutaga konversacio, sed sentas mankon de vortoj kaj volas praktiki la lingvon, estas atendataj en la nivelo B2. Ilin pli progresigos du spertaj instruistinoj, francinoj, ambaŭ novulinoj en BET: Anna Jousions kaj Françoise Noireau.





**4. Tiuj, kiuj jam sufiĉe flue parolas la lingvon,** sed volas pli profunde studi ĝin, devas elekti la superan nivelon C1, kaj labori kun la konataj geinstruistoj Svetlana Smetanina el Rusio kaj Mikaelo Lineckij el Ukrainio.





Se vi dubas, en kiu nivelo vi devus esti, bonvolu serĉi sur la anonctabulo „Memtaksilon“ – kaj tio helpos al vi decidi.

Ĉiuj kursanoj post la fino de la kurso ricevos atestilon pri la lingvokapablo.

**Gražina Opulskienė**

# Gravaj atentigoj

❶ **Organiza komitato** de BET-55 estas en ĉambro n-ro 227 sur la dua etaĝo.

❷ **Libroservo** funkcias ĉiutage en ĉambro n-ro 112 sur la unua etaĝo.

❸ **Redakcio de la ĉiutaga gazeto „Abelo“** funkcias en ĉambro n-ro 226 sur la dua etaĝo.

❹ **La ĉefa salono** de BET-55 estas en ĉambro n-ro 228 sur la dua etaĝo.

❺ **En ĉambroj n-roj 313 kaj 314** sur la 3-a etaĝo estas **komputilaj klasoj kun retaliro**, kies komputilojn rajtas uzi ĉiuj partoprenantoj de BET-55.

❻ **Diversaj prelegoj, kunvenoj, Esperanto-kursoj** okazos en la salonoj n-roj 117, 118 kaj 124 sur la unua etaĝo, en la salonoj 204, 205 kaj 206 sur la dua etaĝo, en la salonoj 303, 304, 305, 306, 307, 308, 310 kaj 311 sur la tria etaĝo.

❼ **Manĝejo (**funkcias ekde matenmanĝo dimanĉe la 7-an de julio) estas en la konstruaĵo J. Žemgulio str 46 sur la unua etaĝo. Manĝado okazos laŭ du alternoj.

❽ **Kelkaj programeroj,** nome: la solena inaŭguro de BET-55, la urba koncerto, la akcepto – okazos en la ĉefa salono de la urba komunuma (kultura) centro str. Kranto 28. Du vesperaj koncertoj la 9-an kaj la 10-an de julio okazos en la sama urba komunuma (kultura) centro) – en la salono de **Aranĝoj**.

❼ **Registrado al la ekskursoj** okazos en la akceptejo sabate, la 6-an de julio, ekde 15.30 kaj dimanĉe la tutan tagon.

❽ **En la prelegejoj la uzanta nomo por komputiloj** estas *seminaras*, la pasvorto ankaŭ estas *seminaras***.**

❾ **Dimanĉe la 7-an de julio** estos organizata komuna perbusa veturado al Komunuma Palaco, por solena inaŭguro de BET-55. Tuj post la unua alterno de la tagmanĝo ĉe la manĝejo estos tri specialaj busoj, kiuj veturos al Komunuma Palaco, laŭvoje haltante apud la ĉefa BET-ejo. Tuj post la dua alterno de la tagmanĝo ĉe la manĝejo estos aliaj tri busoj, kiuj laŭ la sama vojo veturigos niajn homojn al Komunuma Palaco. Post la inaŭguro, koncerto kaj akcepto busoj veturigos vin al la manĝejo.

**Grava rimarko:** en Litovio la teretaĝo titoliĝas kiel la unua etaĝo, ktp. supren. Do, la teretaĝo ne ekzistas.

**Organiza komitato**

# Kantu kune!



**Sabate vespere, post la koncerto de Natalia Bertse, okazos komuna kantado de la Himno de Litovio (Nacia Glorkanto).**

Jam 10 jarojn en Litovio estas tradicio la 6-an de julio, la tagon de la Litovia reĝo Mindaugas, je 21.00 kanti la Himnon de Litovio (Nacian Glorkanton). Sendepende de tio, kie estas litovoj en tiu momento, oni kantas ĝin en la tuta mondo.

| | |
|---|---|
| *Lietuva, Tėvyne mūsų,* | *Litovi' patrujo nia,* |
| *Tu didvyrių žeme,* | *lando de gloragoj* |
| *Iš praeities Tavo sūnūs* | *Viaj filoj ĉerpu forton* |
| *Te stiprybę semia.* | *el pasintaj tagoj.* |
| | |
| *Tegul Tavo vaikai eina* | *Iru via infanaro* |
| *Vien takais dorybės,* | *nur laŭ virta vojo,* |
| *Tegul dirba Tavo naudai* | *Ĝi laboru por bonfarto* |
| *Ir žmonių gėrybei.* | *kaj por bona ĝojo.* |
| | |
| *Tegul saulė Lietuvoj* | *Hela sun' de Litovio'* |
| *Tamsumas prašalina,* | *obskurecon pelu for,* |
| *Ir šviesa, ir tiesa* | *Por klerec' kaj justec'* |
| *Mūs žingsnius telydi.* | *age ni fervoru.* |
| | |
| *Tegul meilė Lietuvos* | *Amo al litova ter'* |
| *Dega mūsų širdyse,* | *brulu ĉiam en la kor',* |
| *Vardan tos Lietuvos* | *Kaj por vi, Litovi',* |
| *Vienybė težydi!* | *unueco floru.* |

V. Kudirka

## Saluton, karaj BET-anoj!

Kiel kutime dum **Baltiaj Esperanto-Tagoj**, ankaŭ dum BET-55 en Panevėžys aperos la ĉiutaga gazeto, ĉi-jare kun la nomo ***Abelo*** (la klarigo en la BET-libro). Vi trovos en ĝi aktualaĵojn, informojn, anoncojn pri salonoj de la programeroj, eventualajn ŝanĝojn de la programo, precizigojn, priskribon de BET-55, fotojn, k.s. Ĝia enhavo dependos ankaŭ de la kontribuoj de la BET-anoj mem, kiuj bonvolu raporti pri siaj impresoj, programeroj, ideoj (eks)kursoj ktp, kaj poste aŭ metu siajn kontribuojn en tiucelan skatolon ĉe la akceptejo, aŭ sendu ilin rete al: *stano.marcek@gmail.com*. Ankaŭ fotoj en komputila formato estas bonvenaj, same kiel pri-BET-aj anekdotoj kaj rakontoj. Ĉiuokaze bonvenon al Panevėžys, kaj ĝuu la 55-an BET-on!

**Stano Marček, redaktoro**

## Novaj aliĝoj al BET-55

393. Anastazija Janušonienė, Litovio
394. Eglė Vindašienė, Litovio
395. Heli Tammik, Estonio
396. Kjell Peder Hoff, Norvegio
397. Viktorija Vičiulytė, Litovio
398. Raimo Tuisku, Finnlando
399. Robert Bogenschneider, Finnlando
400. Ewa Caban, Pollando
401. Dariusz Caban, Pollando
402. Vilius Glušokas, Litovio
403. Vytautas Drasutis, Litovio
404. Mikaelo Abramovich, Rusio
405. Gila Wandel, Israelo
406. Roman Dobrzynski, Pollando
407. Andrzej Romuald Pacholski, Pollando

# Ekskursoj dum BET-55

Registrado al la ekskursoj (vidu la Libron por BET-ano en via kongresa sako) okazos en la akceptejo sabate la 6-an de julio ekde 15.30 kaj dimanĉe dum la tuta tago.

**Tuttaga eskskurso kun surprizoj:**

☛ biergustumado en Biržai-kastelo kaj folklora programo,

☛ en bienpalaco de Pakruojis nuntempe okazas la unua florfestivalo, kiun ni ĝuos,

☛ inkluzivita tagmanĝo en la biena traktiro.

La ekskurso okazos marde, merkrede, depende de la dezirantoj ankaŭ lunde. Prezo – 52 eŭroj.

Dum la duontaga ekskurso antaŭvideblas gustumado de teoj el 4-5 diversj kuracherboj. La ekskurso okazos ĵaŭde. Prezo – 15 eŭroj.

Tempon de la forveturo al la ekskursoj vi ekscios dum la registrado.

Via ekskursgvidanto **Antanas Visockas**
(Esperanto-vojaĝagentejo „Bonvoje“)

